

## Diru tridek tri

[el la Itala Esperanto-Federacio revuo "L'esperanto"]

de Renato Corsetti

### 7) Por komprenigi al eksterlandanoj, kiel sonas vortoj en la bela land' sù-sona: Italaj literoj kaj sonoj en Esperanto

Lastatempe laŭdinde aperis pluraj verkoj, kiuj provas klarigi al eksterlandaj esperantlingvaj legantoj interalie, kiel oni elparolas italajn vortojn. Kompreneble ĉefe temas pri nomoj de historiaj rolintoj kaj de lokoj.

Tiucele, laŭ mi, la unua regulo memorinda estas ke Esperanto estas Esperanto kaj ke la itala estas la itala. Alivorte ĉiu el ili havas siajn regulojn, kaj estas malfacile komprenigi al eksterlandaj esperantistoj, ke oni elparolu Esperanton laŭ la reguloj de la itala. Unu el la ĉefaj problemoj, kiujn mi rimarkis, estas la provo instrui la elparolon de la duoblaj konsonantoj. Bonvolu rezigni pri tiu provo. Multaj eksterlandanoj ne vere aŭdas la malsamecon inter "*pala*" kaj "*palla*". Por ili il "*gioco del pallone*" estas ludo, kiun oni faras per ŝovelilego.

Oni povas diversmaniere signali la pozicion de la akcento, kiu ne falas sur la antaŭlasta silabo, kaj esperi ke homoj sekvos viajn konsilojn.

Mi prezentas malgrandan tabelon por konsili kiel transkribi italajn nomojn el [http://www.bonalingvo.it/index.php/El\\_la\\_itala\\_al\\_Esperanto](http://www.bonalingvo.it/index.php/El_la_itala_al_Esperanto). Temas pri komenca provo. Ĉiu atentigo pri malperfektaĵo estas bonvena.

---

**a** = ĉiam **a** [Ancona = *Ankona*]

---

**b** = ĉiam **b** [Bari = *Bari*]

---

**c**  
**ca, co, cu** = **ka, ko, ku** [Cagliari = *Kaljari*]  
**chi, che** = **ki, ke** [Chieti = *Kjeti*]  
**cia, cio, ciu** = **ĉa, ĉo, ĉu** [Ciocco = *Ĉoko*]  
**ci, ce** = **ĉi, ĉe** [Cesena = *Ĉezena*]

---

**d** = ĉiam **d** [Domodossola = *Domodosola*]

---

**e** = ĉiam **e** [Empoli = *Empoli*]

---

**f** = ĉiam **f** [Firenze = *Firence*]

---

**g**

**ga, go, gu** = **ga, go, gu** [Garfagnana = *Garfanjana*]

**ghi, ghe** = **gi, ge** [Ghisolfa = *Gizolfa*]

**gia, gio, giu** = **ĝa, ĝo, ĝu** [*Giuseppe* = *Ĝusepe*]

**gi, ge** = **ĝi, ĝe** [Giovanni = *Ĝovani*]

**gl** = **lj** [Giglio = *Ĝiljo*]

**gn** = **nj** [Cologno = *Kolonjo*]

---

**h** = nura skriba signo en la itala. Ĝi ne havas apartan sonon, kiam ĝi estas sola.

---

**i**

normale **i** [Imola = *Imola*]

en la diftongoj **j** [Chieti = *Kjetj*]

---

**l** = ĉiam **l** [Lucia = *Luĉia*]

---

**m** = ĉiam **m** [Mario = *Marjo*]

---

**n** = ĉiam **n** [Napoli = *Napoli*]

---

**o** = ĉiam **o** [Otranto = *Otranto*]

---

**p** = ĉiam **p** [Pavia = *Pavia*]

---

**q**

Principe ĉiam **qu** = **kv** [Quarto = *Kvarto*]

**cqu** = **kv**

**qqu** = **kv**

---

**r** = ĉiam **r** [Roma = *Roma*]

---

**s** =

Normale **s** [Corsetti = *Korseti*]

en intervokala pozicio = **z** [Pisa = *Pizo*]

**sce, sci, scia, scio, sciu** = **ŝe, ŝi, ŝa, ŝo, ŝu** [Siacca = *Ŝaka*, Bisceglie = *Biŝelje*]

---

**t** = ĉiam **t** [Tevere = *tevere*]

---

**u**

normale **u** [Puglia = *Pulja*]

en la diftongoj **ŭ** [Luogoameno = *Lŭogameno*]

---

**v** = ĉiam **v** [Vigevano = *Viĝevano*]

---

## **z**

normale **c** [Potenza = *Potenca*]

foje '**dz** [Manzoni = *Mandzoni*]

---

Rimarkoj:

1 - Ne eblas redoni en Esperanto la diferencon inter vasta kaj malvasta "o" kaj vasta kaj malvasta "e". Pescara = *Peskara*, Pontremoli = *Pontremoli*, Como = *Komo*, Torino = *Torino*.

2 - Ne eblas redoni en Esperanto la diferencon inter simplaj kaj duoblaj konsonantoj.  
Caltanissetta = *Kaltaniseta*.